

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej



ilei



VROCLAVO

urbo de renkontiĝoj

Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo

NI KORE INVITAS PARTOPRENI EN

LA 10-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ 2022

La festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.
Ĉiu partoprenonto bonvolu alsendi vian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – **ĝis la 30-a de junio** – la adreso: **festivalo.eo@gmail.com** Tiel okazos konkursa provaŭdo de partoprenantoj. Antaŭ ĉio bonvolu sendi plenigitan aliĝilon.

La Festivalo okazos en tri kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. registrita en studio.

La premioj estos aljuĝitaj por unuaj tri lokoj. Plie estos aljuĝitaj la **Ĉefpremio** kaj **Aŭtora-premio** (ĝin ricevos konkursanto, kiu prezentos plej bone kreitan propran (aŭ speciale por la festivalo) kanton).

La publiko aljuĝos sian premion, la **Publik-premion**, nur al video-kantoj. La voĉdonado okazos rete **ekde la 1-a de julio**.

La 12-an de septembro – rete okazos *Koncerto de la Premiitoj* kaj anonco de rezultoj.

Honoran patronecon pri la festivalo akceptis Jacek Sutryk – la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk – la Prezidanto de la Nomuma Komisiono de la Urba Konsilantaro (Vroclavo) kaj la organizaĵoj: Malsuprasilezia Fedraco de Neregistaraj Organizaĵoj (MFNO), Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), EUROKKA (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo), “Juna Amiko” (unu el plej konataj kaj ŝatataj revuoj de Esperantujo) kaj retradio “Radio KSON” kaj E-senco (E-Societo en Poznano).

La organizanto estas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado
(Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 888 796 629, +48 606 858 640, www.ecem.com.pl/ / <https://www.facebook.com/efekantoj/>

La organiza teamo de la
Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj